

NOVELOJ DE
LUSIN

ĈINA ESPERANTO-LIGO
PEKINO, 1963

ANTIMILITISTO¹

I

Gongsun Gaŭ, disĉiplo de Zihia², vizitis Mo-zi pli ol unu fojon, sed ĉiufoje li ne trovis lin hejme. Probable la kvaran aŭ kvinan fojon fine li feliĉe renkontis lin ĉe la sojlo, ĉar li venis ĝuste kiam Mo-zi revenis hejmen. Ili kune eniris la domon.

Post iom da etiketaĵoj, Gongsun Gaŭ, rigardante al la truo sur la mato, demandis afable:

“Sinjoro, vi estas antimilitisto?”

“Jes,” diris Mo-zi.

“Do ĝentilhomoj ne malpacas?”

“Prave,” diris Mo-zi.

“Eĉ porkoj kaj hundoj iam malpaciĝas, kial ne homoj. . .”

1. Mo-zi, t. e. majstro Mo, la fondinto de moismo, estis granda ĉina pensulo kaj politika aganto en la 5-a jarcento a. K. Li predikis antimilitismon kaj altruismon ami ĉiujn egale. Liajn instruojn kune kun liaj paroloj kaj agoj, la disĉiploj kolektis en libron, el kies 71 ĉapitroj 53 konserviĝis. La ĉefa enhavo de la rakonto troviĝas en la 50-a ĉapitro el la 71, titolita *Gongŝu*. Ĉiuj cititaj nomoj en la novelo, escepte de Gongsun Gaŭ kaj A-Lian, kaj la granda parto de la dialogoj estas aŭtentikaj, kiujn oni povas trovi tie aŭ ĉi tie en la libro *Mo Zi*. La regnoj Ĉu, Song, Jue kaj Lu, menciitaj en la novelo, estis feŭdaj landoj de Ĝoŭ-dinastio, siatempe. Regno Lu troviĝis en la nuna Ŝandong-provinco.

2. Disĉiplo de Konfucio.

1

3

1. 2
3
“Aj, aj, vi konfucianoj parole ĉiam mencias Jaŭ kaj Ŝun,³ dum age volas imiti la porkon kaj hundon, kia domaĝo, kia domaĝo!” Mo-zi ekstaris kaj rapidis al la kuirejo daŭrigante: “Vi ne komprenas mian ideon. . .”

4. 5
6. 7
8
Li iris tra la kuirejo al la puto ekster la malantaŭa pordo, tiris la puliŝnuron kaj suprenigis duonan kruĉon da akvo. Li levis ĝin al la buŝo kaj trinkis el ĝi pli ol dek englutojn, poste formetinte la argilan kruĉon, viŝis sian buŝon, kaj subite kriis al la direkto de la ĝardenangulo:

“Kial vi revenis, A-Lian?”

“Majstro!” A-Lian jam vidis lin, alkuris kaj haltis respekte antaŭ li kun la manoj pendantaj ĉeflanke kaj diris iom malkontente:

9
10
11. 12
“Mi forlasis la postenon. Ne unuecas iliaj parolo kaj ago. Oni ja promesis doni al mi mil pelvojn da milio, sed pagas nur kvincent. Mi ne povas plu resti.”

“Se ili pagus pli ol mil, ĉu vi abdikus?”

“Ne,” A-Lian respondis.

13
“Do la kaŭzo ne estas ilia senunueco inter la parolo kaj ago, sed estas tio, ke ili pagas tro malmulte!”

Parolante Mo-zi reiris en la kuirejon kaj ordonis:

14. 15
“Gengĝuzi, knedu por mi maizan farunon!”

Gengĝuzi ĵus enpaŝis el la ĉefa ĉambro. Li estis brava junulo.

“Ĉu mi preparu sekan provizaĵon por pli ol dek tagoj, majstro?” li demandis.

“Prave,” diris Mo-zi. “Ĉu Gongsun Gaŭ jam foriris?”

“Foriris,” Gengĝuzi ridetis. “Li tre koleris kaj diris, ke ni amas ĉiujn sendistinge kiel bestoj.”

Mo-zi ankaŭ ridetis.

“Vi vojaĝos al Regno Ĉu?”

3. Jaŭ kaj Ŝun estis antikvaj reĝoj konsiderataj laŭ legendo kiel plej idealaj, regantaj laŭvice en la 24-a kaj 23-a jc. a. K.

“Jes, ĉu ankaŭ vi eksciis pri tio?” Mo-zi, lasante Gengĝuzi knedi la maizan farunon per akvo, prenis silikon kaj tindron, elfrapis fajron kaj bruligis sekajn branĉojn por boligi akvon. Fiksante sian rigardon al la flamo, li diris malrapide:

“Gongŝu Ban, nia samlandano, fieras pri sia ioma klereco, ĉiam fermentigas malkvieton inter la landoj. Li fabrikis *goŭ-ĝu-on*⁴ kaj instigis la reĝon de Regno Ĉu batali kontraŭ Regno Jue. Ne kontentiĝinte pri tio, nun li elpensis *junti-on*⁵ kaj ree instigis la reĝon invadi Regnon Song. Song estas malgranda lando, kiel ĝi povus elporti la atakon! Mi iros lin haltigi.”

Trovinte, ke Gengĝuzi jam metis la pastaĵojn sur la fornon, li reiris en sian ĉambron. El enmura ŝranko li elprenis manplenon da sekigita peklita brasiko kaj difektitan bronзан tranĉilon. Krome li elserĉis truitan paktukon kaj envolvis ĉion, kiam Gengĝuzi alportis la vaporumitajn pastaĵojn. Li kunportis nek vestojn nek viŝtukon, nur iom streĉis la zonon kaj iris ekster la ĉefan ĉambron. Tie li surmetis pajlajn sandalojn, surdorsigis la pakaĵon kaj foriris ne rerigardante. Vaporo ankoraŭ eliĝis en ekblovoj el la pakaĵo.

“Kiam vi revenos, majstro?” Gengĝuzi kriis post li.

“Eble post dudek tagoj, ne pli frue,” Mo-zi respondis ne haltante.

2

Kiam Mo-zi eniris la landlimon de Regno Song, la laĉoj de liaj pajlaj sandaloj jam rompiĝis tri aŭ kvar

4. Hoko kaj forbarilo, instrumentoj por ŝipbatalo.

5. Nubeskalo — instrumento por ataki citadelon.

1 fojojn. Li sentis la plandojn tre varmaj. Li haltis kaj
 2 demetis la sandalojn. Iliaj plandoj eluziĝis je grandaj
 3 truoj. La piedoj ie kaliĝis kaj ie troviĝis ankaŭ viziketoj.
 Li ne zorgis pri ili kaj daŭrigis sian vojaĝon. Survoje
 li iom observis. La loĝantaro estis ne malmulta. Sed
 4 la postsignoj de antaŭaj superakvoj kaj militoj ĉie restis.
 Ili ne ŝanĝiĝis tiel rapide kiel la loĝantaro. Tri tagojn
 li vojaĝis, sed ne vidis eĉ unu grandan domon, unu altan
 5 arbon, unu viglan homon, aŭ pecon da fruktodona tero.
 Tiel li alvenis al la ĉefurbo.

La urba muro estis malnova kaj difektita. Sed tie
 kaj ĉi tie novaj ŝtonoj estis almetitaj. Ĉe la ĉirkaŭfosaĵo
 6 staris kotamaso. Ŝajne oni tie fosis antaŭ nelonge. Kelkaj
 nenionfarantaj homoj sidis ĉe la fosaĵo verŝajne por
 fiŝkapti.

“Eble ili jam ricevis informojn,” pensis Mo-zi.
 Rigardante la fiŝkaptantojn li trovis inter ili neniun el
 siaj disĉiploj.

Li decidis iri tra la urbo, do li alproksimiĝis al la
 norda pordego, kaj iris rekte suden laŭ la meza strato.
 Ankaŭ en la urbo estis dezerte, sed tre kviete. Sur la
 8 fasado de ĉiu butikoj estis surgluita afiŝo de prezmalaltigo.
 Sed aĉetantoj ne troviĝis. Ankaŭ ne estis multe da varoj
 en la butikoj. La straton kovris subtila kaj glueca flava
 polvo.

“Jam en tia kompatinda stato, kaj oni volas ĝin
 invadi!” pensis Mo-zi.

Li iris laŭ la ĉefa strato, kaj rimarkis nenion ekster-
 ordinaran krom malriĉo kaj senforteco. La novaĵo pri
 la intencita invado de Regno Ĉu, ŝajne, estis aŭdita. Sed
 9 kutimiĝinte al invadoj, ĉiuj konsideris tion sia antaŭ-
 fiksita sorto kaj trovis en ĝi nenion speciale atentindan.
 Cetere restis al ĉiuj nenio krom la vivo senmanĝa kaj
 senvesta, tial neniuj pensis pri rifuĝo. Kiam la gardoturo
 de la suda pordego aperis antaŭ lia rigardo, li rimarkis

grupeton da homoj kolektiĝintan ĉe stratangulo. Verŝajne ili aŭskultis ies rakontadon.

Kiam Mo-zi alproksimiĝis, li vidis, ke la rakontanto plengorĝe krias kun mansvingo:

“Ni montru al ili la nacian spiriton de Regno Song! Ni mortu kune por la patrujo!”

Mo-zi rekonis, ke tio estas la voĉo de Caŭ-gongzi, lia disĉiplo.

Tamen li ne enŝoviĝis por alparoli lin, sed rapidis el la suda pordego, kaj daŭrigis sian vojaĝon. Li marŝis ankoraŭ unu tagon kaj grandan parton de la sekvanta nokto, tiam haltis kaj sub tegmentrando de iu kamparano dormis ĝis tagiĝo. Vekiĝinte li marŝis plu. La pajlaj sandaloj jam rompiĝis je pecoj kaj estis ne plu porteblaj. En la paktuko restis ankoraŭ pastajoj. Do ĝi estis ekster konsidero. Li deŝiris tolpecon de la subvesto kaj volvis la piedojn.

La tolo estis maldika kaj la malebena kampvojo dolorigis liajn piedojn; li iris pli malfacile. Posttagmeze li sidiĝis sub malgrandan soforon, malvolvis la pakajon kaj prenis tagmanĝon por iom refreŝiĝi. De malproksime granda viro puŝis tre pezan ĉaron en lian direkton. Proksimiĝinte, la viro haltigis la ĉaron, paŝis al Mo-zi kaj salutis: “Majstro!” Dume li forviŝis per vestangulo la ŝviton de sur la vizaĝo kaj spiregis.

“Ĉu tio estas sablo?” Mo-zi rekonis en li Guan Kian-aŭ, sian disĉiplon, kaj demandis.

“Jes, por rebati la nubeskalojn.”

“Kiel progresas la aliaj preparaĵoj?”

“Ni kolektis iom da kanabo, cindro kaj fero. Tamen, tre malfacile. Kiuj havas, ne donas; kiuj volonte donas, ne havas. La plejgranda parto de la homoj nur diras malplenajn vortojn. . . .”

“Hieraŭ en la urbo mi aŭdis la paroladon de Caŭ-gongzi. Li ree fanfaronis pri ‘spirito’ kaj plengorĝe kriis

pri 'morto'. Diru al li, ke li ne ĵonglu per la malplenaĵoj! Morti estas ne malbone, cetere tre malfacile. Sed unue ĝi estu utila al la popolo."

"Li estas malfacile alparolebla," Guan Kian-aŭ respondis malgaje. "Li ne tre volonte parolas kun ni post la dujara servado kiel ŝtatoficisto ĉi tie."

"Kaj Kin Guli?"

1 "Tre okupita. Li ĵus provis la arbaleston; nun li verŝajne estas ekster la okcidenta pordego por esplori la aspekton de la regiono kaj tial ne renkontis vin, majstro. Nun vi iras al Regno Ĉu por viziti Gongŝu Ban?"

2 "Jes," diris Mo-zi. "Tamen estas neantaŭvideble ĉu li aŭskultos min aŭ ne, vi devas daŭrigi vian preparadon. Ne tro fidu al la sukceso de la buŝo kaj lango."

3 Guan Kian-aŭ aŭskultis kun kapbalancoj. Li vidis
4 Mo-zi resurvojiĝi kaj dum ioma momento akompanis lin
5 per rigardo, kaj poste puŝis la ĉaron knarantan en la urbon.

3

6 7 8 9
Jing, la ĉefurbo de Regno Ĉu, estis tute alia ol Regno Song. La stratoj estis larĝaj kaj la domoj en bona ordo. Grandaj butikoj estis plenaj de multspecaj bonaj varoj: neĝblanka lintolo, freŝruĝaj kapsikoj, makulriĉaj cervofeloj kaj dikaj lotusosemoj. La pasantoj, kvankam malpli grandaj en staturado ol la nordlandanoj, aspektis tre viglaj kaj energiaj, kaj ĉiuj estis en puraj vestoj. Kompare kun ili, Mo-zi en siaj ĉifonoj kaj kun piedoj volvitaj en tolo, ŝajnis veterana almozo.

10 Meze de la urbo estis vasta placo, sur kiu troviĝis multe da budoj, kaj syarmis homoj. Tie estis la plej

brua bazarejo kaj ankaŭ vojkruciĝo. Li trovis maljunulon, kiu aspektis kiel intelektulo, kaj petis de li informon pri la loĝejo de Gongŝu Ban. Sed ili ne komprenis unu la alian. Ĝuste kiam Mo-zi komencis skribi sur sia manplato por konigi al li kion li deziras, oni ekkantis ĥore kun tondra voĉo. Ĉar la tre fama kantistino, Saj Hiangling, kantis *Hiali Bajen*⁶ kaj allogis ĉiujn loĝantojn partopreni en la kantado. Baldaŭ ankaŭ la maljuna intelektulo jam komencis zumi ion per la buŝo. Mo-zi sciis, ke li ne rigardos la skribaĵon sur lia manplato, do forlasis lin kun la nefinita vorto. Tamen ĉiu okupis sin per kantado, kaj neniu atentis lin. Pasis longa tempo, iom post iom reregis kvieto, ŝajne jam finiĝis la kantado. Li fine trovis ĉarpentistan laborejon por informiĝi pri la loĝejo de Gongŝu Ban.

“Ĉu la ŝandongano sinjoro Gongŝu Ban, kiu fabrikis *goŭ-ĝu-on*?” La mastro estis flavavizaĝa dikulo kun nigra barbo. Li bone sciis. “Ne malproksime. Reiru tra la vojkruciĝo kaj turniĝu sud-orienten laŭ la dua strateto dekstre. Poste laŭiru la stratangulon norden. La tria domo. Jen.”

Mo-zi skribis kion li aŭdis sur la manplato kaj demandis ĉu li komprenis ĝuste. Li memoris ĝin. Adiaŭinte la mastron kun dankesprimo kaj turnis sin grandpaŝe al la indikita loko. Efektive sur la pordo de la tria domo surfiksiĝis bele ĉizita nomtabulo el tre bonkvalita ligno kun la surskribo: Gongŝu Ban el Regno Lu.

Mo-zi frapis la kupran pordringon plurfoje. La pordo malfermiĝis kaj aperis kolera pordisto. Ekvidante Mo-zi, li kriaĉis laŭtvoĉe:

“Lia sinjora moŝto ne akceptas. Tro multe da viaj samlandanoj venis peti pri helpo.”

6. Populara kanto de antikvaj ĉu-anoj.

Mo-zi apenaŭ havis tempon por ĵeti rigardon al li, antaŭ ol li fermis la pordon. Jam nenia respondo venis al refoja frapado. Tamen tiu rigardo de Mo-zi embarasis la pordiston tiel, ke li ne povis sin trankviligi. Li eniris kaj anoncis vole nevole. Gongŝu Ban estis mezuranta la modelon de nubeskalo per ĉarpentista liniilo.

“Sinjoro, jen ankoraŭ unu el viaj samlandanoj venas peti vian helpon. . . li estas iom stranga. . .” la pordisto diris mallaŭte.

“Kia estas lia familia nomo?”

“Mi ne demandis. . .” la pordisto respondis embarasite.

“Kiel li aspektas?”

“Ŝajne almozulo. Ĉirkaŭ tridekjara. Altkreska, kun nigra vizaĝo. . . .”

“Ha! Tio estas Mo Di⁷ sendube!” Gongŝu Ban kriegis surprizite. Li formetis la modelon de nubeskalo kune kun la ĉarpentista liniilo kaj malsuprenkuris laŭ la ŝtupoj. La pordisto same surprizita rapidis preter li kaj malfermis la pordon.

Mo-zi kaj Gongŝu Ban renkontiĝis en la korto.

“Efektive estas vi,” Gongŝu Ban diris entuziasme kaj invitis lin en la salonon. “Ĉu vi fartas bone? Ĉu tre okupita kiel antaŭe?”

“Jes, ĉiam tiel. . . .”

“Do kion vi volas diri al mi, alvojaĝante el tia malproksimo?”

“En nordo iu insultis min,” Mo-zi diris trankvile. “Mi petas, ke vi mortigu lin por min venĝi.”

Gongŝu Ban ofendiĝis.

“Mi donos al vi dek juanojn!” Mo-zi aldonis.

7. Di estas la persona nomo de Mo-zi.

Je tiu parolo la mastro de la domo ne povis plu reteni sin de kolero kaj respondis malvarme kun severa mieno.

“Mortigo kontraŭas mian principon!”

“Bonege!” Mo-zi forte tuŝita stariĝis kaj dufoje riverencis al li, poste reparolis kviete: “Sed mi havas ankoraŭ ion por diri al vi. En nordo mi aŭdis, ke vi fabrikis nubskalton por invadi Regnon Song. Nu, kian kulpon ĝi havas? Regno Ĉu havas tro multe da tero, sed mankas al ĝi popolo. Mortigi ion, kio mankas, por akiri tion, kion ĝi havas tromulte, ne estas saĝe. Ataki senkulpan popolon estas senkore. Scii tion sed ne malkonsili signifas ne esti fidela al la reĝo. Se vi jam admonis, sed ne sukcesis, tio montras malenergiecon. Vi havas kiel principon, neniam mortigi homojn, eĉ malmulte, tamen vi komencos mortigi tre multe: tio ne estas konsekvenca. Kiel vi opinias, sinjoro?”

“Tio estas . . .” enpensiĝis Gongŝu Ban. “Vi parolas prave, sinjoro.”

“Do vi ĉesos ataki Regnon Song?”

“Neeble,” Gongŝu Ban diris malgaje. “Mi jam parolis kun lia reĝa moŝto.”

“Do prezentu min al lia reĝa moŝto.”

“Bone. Sed jam malfruas, ni iros post tagmanĝo.”

Sed Mo-zi ne konsentis. Sidante kun antaŭen klinita korpo li ĉiam volis leviĝi. Li ne kutimis sidi longe. Gongŝu Ban konis lian kutimon kaj konsentis tuj iri. Li eniris sian ĉambron kaj alportis el tie kostumon kun paro da ŝuoj kaj proponis sincere:

“Bonvolu ŝanĝi vian veston. Ĉar tie ĉi estas alie ol en nia hejmlando, oni estimas lukson. Estus pli konvene, se vi ŝanĝus vian veston. . . .”

“Bone, bone,” Mo-zi ankaŭ diris sincere. “Fakte, ankaŭ mi ne ŝatas la ĉifonaĵon. . . simple mi ne havas la tempon por ofte ŝanĝi. . . .”

4

La reĝo delonge sciis, ke Mo-zi estas saĝulo en la nordo, kaj post la rekomendo de Gongŝu Ban, sen malfacilaĵo, tuj donis aŭdiencon.

En tro mallonga vesto Mo-zi post Gongŝu Ban eniris la salonon kiel longkrura ardeo. Li riverencis kaj ekparolis trankvile:

“Jen homo, kiu ne ŝatas sian kaleŝon, sed volas ŝteli la difektitan ĉaron de najbaro; kiu ne ŝatas sian broditan silkaĵon sed volas ŝteli la mallongan feltan bluzon de najbaro; kiu ne ŝatas siajn rizon kaj viandon, sed volas ŝteli la branaĵon de najbaro; kia homo li estas?”

“Li certe suferas kleptomanion,” la reĝo diris malkaŝe.

“Nun la teritorio de Regno Ĉu kovras kvin mil liojn kvadrato, dume tiu de Regno Song nur kvincent. Ĉu tio ne similas al luksa kaleŝo kompare kun aĉa ĉaro? Regno Ĉu havas Jun-Mong, kie abundas rinoceroj, sovaĝaj bovoj kaj cervoj, kaj la abundeco de fiŝoj kaj kelonioj en Giangŝuj kaj Hanŝuj estas senrivala. Dume en Regno Song ne troviĝas eĉ fazanoj, leporoj aŭ karpetoj. Tio — ja similas al rizo kaj viando kompare kun branaĵo. En Regno Ĉu abundas ĉiaj bonkvalitaj grandaj arboj, dume en Regno Song tiaj tute ne ekzistas. Tio — ja similas al brodita silkaĵo kompare kun mallonga feltbluzo. Laŭ mia opinio, invadante Regnon Song viaj oficistoj agas same kiel tiu kleptomaniulo.”

“Vi diras veron,” la reĝo kapjesis. “Tamen Gongŝu Ban jam fabrikis nubskalton por mi. Ne decas, ke ĝi restu sen utilo, kaj oni devas batali.”

“Tamen via venko ne estas certa,” diris Mo-zi. “Se troviĝas lignoŝtipoj, nun ni povas provi.”

La reĝo estis sciemulo. Li aŭdis tion kun plezuro, kaj ordonis, ke oni tuj alportu ŝtipojn. Mo-zi demetis sian zonon kaj faris kurbon per ĝi kontraŭ Gongŝu Ban kiel urbon. Poste li dividis la ŝtipojn en du partojn, donis unu parton al Gongŝu Ban kaj konservis la alian duonon por si. Tiuj estis la bataliloj de la atakanto kaj defendanto.

Ili komencis batali per la ŝtipoj kiel en ŝakludo. La ŝtipoj de la atakanto ŝoviĝis antaŭen, tiuj de la defendanto ilin forbaris. Unu flanko retiriĝis, la alia puŝiĝis antaŭen. La reĝo kaj liaj korteganoj komprenis nenion.

Ili tiel moviĝis antaŭen kaj malantaŭen naŭ fojojn. Ambaŭ ŝajne ŝanĝis naŭfoje siajn manovrojn, la atakanto kaj la defendanto. Poste Gongŝu Ban ĉesis ludi, kaj Mo-zi turnis la kurbon al si, ŝajne, tiufoje li rolis la atakanton. La ŝtipoj antaŭeniris aŭ retiriĝis kiel antaŭe. Tamen en la tria fojo la ŝtipoj de Mo-zi jam eniris la kurbon de la leda zono.

Kvankam la reĝo kaj liaj korteganoj komprenis nenion, tamen, vidante, ke Gongŝu Ban la unua elreviĝe formetis la ŝtipojn, ili sciis, ke li estas venkita ambaŭfoje.

Ankaŭ la reĝo sentis iom da seniluziigo.

“Mi scias kiel venki vin,” Gongŝu Ban diris honteme post momento. “Sed mi ne eldiros.”

“Ankaŭ mi scias, kiel vi venkus min,” Mo-zi respondis kviete. “Sed mi ne eldiros.”

“Kion vi aludas?” La reĝo demandis kun miro.

“Li nur intencas min mortigi,” Mo-zi turnis sin kaj respondis. “Laŭ lia opinio, se li mortigus min, neniu defendus Regnon Song kaj li certe sukcesus. Tamen miaj tricent disĉiploj, Ĝin Guli kaj la aliaj, jam atendas sur la urbmuŝo de Song kun miaj defendiloj la

invadontojn el Regno Ĉu. Eĉ se li mortigus min, li neniel havus pli da ŝanco por sukceso.”

“Tre efika rimedo!” La reĝo diris tuŝite. “Do mi ne atakos Regnon Song.”

5

Persvadinte la reĝon rezigni pri la invado, Mo-zi intencis tuj reveni al Regno Lu, tamen li devis redoni unue la vestaĵojn al Gongŝu Ban, do li vole nevole iris kun li al lia loĝejo. Estis jam posttagmezo kaj ambaŭ sentis malsaton. La gastiganto kompreneble invitis lin al tagmanĝo — eble jam vespermanĝo, kaj petis lin pasigi la nokton en lia domo.


“Hodiaŭ mi devas foriri,” respondis Mo-zi, “kaj revenos la venontan jaron. Tiam mi alportos mian verkon kaj prezentos ĝin al la reĝo.”

“Ĉu vi ne parolas pri justeco?” diris Gongŝu Ban. “Dolorigi kaj lacigi siajn spiriton kaj korpon por helpi la suferantojn, estas la tasko de plebaĉoj. Similaĵojn la nobeloj ne akceptos. Kaj li ja estas reĝo, kara samlandano!”

“Mi ne tiel opinias. Silko, lino, rizo kaj aliaj grenoj, ĉio devenas de la laboro de la plebaro, tamen la nobeloj akceptas senescepte; kial ne same la justecon?”

“Vi estas prava,” Gongŝu Ban diris entuziasme. “Ne vidante vin, mi volis invadi Regnon Song; kiam mi vidas vin, eĉ se vi donacus ĝin al mi, mi ja ne akceptus, se tio estas maljusta.”

“Tiukaze mi jam vere donacis al vi Regnon Song, se vi ĉiam agos juste, mi eĉ donacos al vi la tutan mondon.”



Ili komencis batali per la ŝtipoj kiel en ŝakludo.

De Hia Tongguang

Dum la interparolado la tagmanĝo estis alportita. Fiŝo, viando kaj ankaŭ vino. Mo-zi nek trinkis vinon nek manĝis fiŝon. Li nur manĝis iom da viando. Gongŝu Ban trinkis sola. Kiam li rimarkis, ke Mo-zi manĝas tre malmulte, li bedaŭris kaj invitis lin preni iom da kapsiko. 1

“Manĝu, manĝu!” Li invitis sincere, montrante al la kapsika kondimento kaj dabingo: “Gustumu! Ĝi ne estas malbona. Nur la fistuloso ne estas tiel dika kiel en nia lando.” 2 3

Post kelkaj glasoj Gongŝu Ban pligajiĝis.

“Por ŝipobatalo mi havas hokon kaj forbarilon, ĉu ankaŭ via justeco havas ilin?” li demandis. 4 5

“La hoko kaj forbarilo de justeco estas pli bonaj ol la viaj,” Mo-zi respondis kun firma voĉo. “Mi altiras per amo kaj fortentas per ĝentileco. Sen amo ne ekzistos solidareco kaj sen ĝentileco estiĝos frivoleco. Frivoleco kaj malsolidareco tuj naskos disiĝon. Ami kaj respekti unu la alian egalas reciproke utili. Dum vi altiras per hoko kaj fortentas per forbarilo, do aliaj faros la samon al vi. Ĉu tio ne estas reciproka malutilo? Tial tiuj de mia justeco estas pli bonaj ol la viaj.” 6 7

“Tamen, kara samlandano, via justeco preskaŭ rompis mian fanbovlon.⁸” Gongŝu Ban ŝanĝis la temon kun iom da ebrieco kiam li estis refutita, ĉar fakte li ne povis multe trinki. 8

“Tamen estas pli bone ol rompi ĉiujn fanbovlojn de la songanoj.” 9

“Sed estonte mi povos fabriki nur ludilojn. Atendu, samlandano, mi montros al vi ian bagatelaĵon.”

8. Rompi la fanbovlon: eksigi iun de la posteno, per kiu oni perlaboras sian ĉiutagan panon, t. e. forpreni de iu la vivrimedon.

1 Parolante, li ekstaris kaj rapidis en sian ĉambron.
 2 Ŝajne li traserĉis la kofrojn. Post momento, li reaperis
 tenante en la mano pigon el ligno kaj bambuo. Li prezentis ĝin al Mo-zi dirante:

“Streĉite ĝi povas flugi tri tagojn. Tio ja estas tre lerte farita.”

3 “Tamen ĝi ne valoras tiom, kiom la veturilradoj
 4 faritaj de ĉarpentisto.” Mo-zi rigardis kaj formetis ĝin
 5 sur la maton dirante: “Li prilaboras tri colojn da ligno
 tiel, ke ĝi povas porti kvindek ŝi-ojn⁹. Ĉio, kio utilas
 al la homoj, estas lerte farita kaj bona; kio ne utilas al
 la homoj, estas mallerte farita kaj malbona.”

6 “Ho, mi forgesis,” Gongŝu Ban malebriiĝis refoje
 refutite. “Mi ja devis scii, ke tia estas via opinio.”

“Tial agu ĉiam juste!” Mo-zi rigardis al liaj okuloj kaj diris sincere. “Ne nur lerteco, eĉ la tuta mondo apartenos al vi. Mi ĝenas vin tro longe. Ĝis la venonta jaro!”

7 Dirinte tion, Mo-zi prenis sian pakaĵeton kaj adiaŭis
 8 la gastiganton. Gongŝu Ban sciis, ke li estas neretenebla,
 kaj konsentis. Li akompanis lin ĝis la pordo. Reveninte
 li pensis momente kaj enŝovis la modelon de nubeskalo
 9 kaj la lignan pigon en kofron en la malantaŭa ĉambro.

10 Sur la reirvojo Mo-zi marŝis malpli rapide. Unue,
 li laciĝis; due, liaj piedoj doloris; trie, la seka provizaĵo
 11 elĉerpiĝis kaj li sentis malsaton; kaj laste, ĉar la afero
 estis aranĝita, jam ne necesis rapidi kiel antaŭe. Tamen,
 tiufoje li estis ankoraŭ pli malfeliĉa ol dum la alvojaĝo.
 12 Apenaŭ enirinte la landlimon de Regno Song, li estis
 dufoje traserĉita. Kiam li alproksimiĝis al la ĉefurbo,

9. Ŝi-o, malnova mezunuo de pezo, egalas proksimume 120 ĝinojn aŭ 60 kg.

li renkontis la kolektantojn de landsava donaco kaj oferis sian paktukon. Ĉe la suda pordego pluvego trafis lin. Li klopodis ŝirmi sin sub la pordego, sed estis forpelita de du patrolanoj kun lancoj. Tramalsekiĝinte li malsanis pli ol dek tagojn pro nazkataro.

Aŭgusto 1934.

(Trad. S. J. Zee)